


# LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO  
POR LA

JUNULARO KAJ  
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:  
West-Grafdijk (N.H.)  
Nederlando.  
Gironumero 209354 Nederlando.

Jarabono:  
Nederlando: 0.80 guldeno  
Eksterlande: 11 fr.fr.; 0.70 dol;  
2.1 sv. fr.

Por progresintoj.

## LA SKRIBO SUR LA STONO.

Tre malproksime, en orienta lando, iam vivis maljuna, saĝa viro. Ĉiu, kiu bezonis helpon, iris al li kaj jam al multaj homoj li donis konsilon kaj kuraĝon. Kaj en neniurbo en la oriento oni vivis tiel orde kiel en la urbeto de la maljuna Melhioro. La homoj tie kutimis obei liajn konsilojn — kaj pri tio ili ne bezonis penti. Kiam fremduloj la urbeton vizitis, ili miris pri la bonaj interrilatoj kaj la gaja humoro, kiuj regis tie. Kelkfoje okazis, ke ili faris viziton al la maljuna saĝulo kaj provis iom lerni de li.

Kiel patro Melhioro ekhavis sian saĝon, — kiu estis lia instruinto? Ho, la homoj ĉirkaŭ li ne pensis pri tio; patro Melhioro ekzistis ja.

Sed iam fremdulo faris al li jenan demandon: „Patro Melhioro, vi kapablas fari multon, vi faras multan bonon, vi estas la plej saĝa el la tuta lando. Kiel vi akiris vian saĝon?”

Tiam patro Melhioro ridetis. „Al tio mi volas doni respondon,” li diris.

„Ho, volonte,” la fremdulo ĝoje diris, „sed vi ne uzu tro multe da sciencaj vortoj, ĉar tiom instruita mi ne estas.”

„Neniun malfacilan vorton mi bezonos,” diris patro Melhioro. „Kaj vi ankaŭ ne bezonas tiom profunde sulkigi la frunton. Infano povas kompreni ĝin; nur simpla rakonto ĝi estas.”

Kaj post tio la maljuna Melhioro rakontis:

„Mi estis ankoraŭ nur tre malgranda knabo, kiam mi jam rimarkis, kiaj malbonaj, malagrablaj aferoj okazas en la mondo. Mia patro havis malgrandan legom-butikon kaj estis ĉe ni servisto, kiu

priŝtelis nin. Li forprenis la monon el la tirkesto kaj ni estis jam tre malriĉaj, tiel ke ni preskaŭ ne povis vivteni nin. Sed tio estis certe indiferenta al la servisto. Mi aŭdis, kiel la homoj en nia strato sin reciproke insultas; kelkfoje okazis interbataloj kaj ankaŭ la infanoj jam partoprenis. Ili turmentis unu la alian kaj neniu ludilo estis sekura. Sed mi vidis ankaŭ, ke tiuj malafablaj, malhonestaj kaj senkompataj homoj kaj infanoj estas malfeliĉaj. Kaj, kvankam mi estis malgranda, mi jam pensis pri tio, ĉu ne estos trovebla io, kio pli feliĉigos la homojn.

Ofte mi sola forpromenis. Ekster la urbeto estis granda sablokampo kaj plaĉis al mi sidi tie kaj desegni figurojn en la sablo. Iam farante tion — mi jam desegnis kamelon kaj intencis aldoni akvoputon — mi puŝis kontraŭ io malmola. Ĝi estis ŝtono kaj eltirinte ĝin, mi vidis, ke sur ĝi staras diversaj figuroj, mirigaj signoj, pri kiuj mi neniom komprenis. Sed tamen estis klare al mi, ke ili estas malnovaj litersignoj. Tiajn ŝtonojn oni jam plurfoje trovis kaj ili estis multvaloraj. Ili estis tre malnovaj, kelkfoje eĉ milojn da jaroj, kaj malnovaj aĵoj havas ĉiam grandan valoron. Kaj tian ŝtonon mi trovis! Kiom da feliĉo por malriĉuloj, kiaj ni estis!

Sed tamen, mi ne tuj kuregis hejmen kun ĝi. Mi pristudis la signojn, sed povis konkludi neniom. Kaj tamen mi sentis, kvazaŭ sur tiu ŝtono staras tio, kion mi serĉas. Se mi nur povus legi la malnovan saĝaĵon, mi sciis feliĉigi la homaron.

Mi desegnis la figurojn sur skatoleton, kiun mi portis ĉe mi. Iam mi certe renkontos homon, kiu estos sufiĉe instruita por ilin klarigi al mi. Tiam mi levis la ŝtonon kaj ekiris hejmen.

Sed kun tia granda, okulfrapa ŝtono oni ne venas malproksimen! Kaj certe ne malgranda knabo, kia mi, kiu krome loĝis inter ŝtelemaj homoj! Jam ĉe la rando de la urbo mi renkontis du virojn, kiuj perforte prenis mian ŝtonon. Neniam mi revidis ĝin.

Post tiu tago mi pli ofte demandis min, kial la homoj tiel malafable kondutas kaj kial ĉiuj kune estas malfeliĉaj.

La instruisto en la lernejo rimarkis, ke mi deziras ekscii multon, tial li zorgis, ke mi poste povis daŭrigi la studadon. Mi lernis multon, mi legis dikajn librojn. Mi sciigis pri multaj aferoj, sed tamen ne pri tio, kion mi serĉadis. Ankoraŭ neniu povis rakonti al mi, kion signifis la skribo sur la ŝtono.

La skatoleton mi konservis ĉiam; la signojn mi sciis preskaŭ parkere. Kaj vi komprenas, kiom multe mi miris, vidante ilin foje en gazeto! Jen staris foto de la ŝtono, kiun iam mi trovis.

„Antaŭ jaroj,” estis aldonite, „ĉi tiu ŝtono troviĝis ĉe viro, kiu estis morte vundita de kureganta ĉevalo kaj enportita en mal-sanulejon. — Antaŭ ol li mortis, la kuracisto rakontis al li, kio estas legebla sur la ŝtono. „Estu bona al ĉiu, deziru por ĉiu la plej bonan, kaj ĉio ordiĝos.” Kiam la viro tion aŭdis, li kuŝis longe silenta, la larmoj ruliĝis sur liaj vangoj kaj fine li konfesis, ke li tute ne faris laŭ la surskribo kaj, ke lia lasta ago estis priŝtelo al malriĉa knabeto. Tuj antaŭ sia morto la viro komprenis, kiom malbone li ĉiam vivis.”

Nun mi do sciis. „Estu bona por ĉiu, — deziru al ĉiu la plej bonan, kaj ĉio ordiĝos.” Certe vi diros: ĉu sufiĉas? Jes, vere tio estas sufiĉa!

Post tiu tago mi provis tiel vivi kaj ankaŭ instrui tion al aliaj homoj. Kaj vi povas vidi, kiom pli feliĉaj la homoj en tiu ĉi urbeto estas ol la plimulto de la ceteraj. Mi do bone sentis, ke sur tiu ŝtono staris, kion mi serĉadis!”

„Kaj”, demandis la fremdulo, „ĉu vi iam rericevis la ŝtonon?”

„Ne,” respondis patro Melhioro, „tiu kuracisto dum jaroj konservis ĝin kaj fine ĝin donacis al iu muzeo. Neniam mi klopodis reakiri ĝin. Kiel mi povus pruvi, ke tiu knabeto estis mi? Miaj gepatroj jam mortis, do ilin mi ne povus ĝojigi per la mono. — Sed la malnovan saĝon, skribitan sur ĝi, mi ĉiam konservis en mia koro.”

„Estu bona por ĉiu, — deziru al ĉiu la plej bonan — kaj ĉio ordiĝos.”

Tio sonas tre simple, kaj estas tre facile kompreneble, ke la homoj laŭ tio povos esti feliĉaj. Sed tamen ŝajnas al la homoj tre malfacile vivi tiel.”

Meditante la fremdulo foriris. Li volis provi tion, kaj paroli pri tio en sia lando.

Trad. VANE.

### KIO ESTAS LA NEBULO?

Kvarjara knabino demandis la patrinon, kio estas pluvo, kaj la patrino klarigis al ŝi: „Kiam pluvas, Dio ploras kaj kiam la suno brilas, Dio ridas!”

Iun tagon, kiam estis nebulo diris la knabino al la patrino: „Panjo, Dio hodiaŭ — fumas!”

#### **Korekto:**

Sur la antaŭa No de „LJV” staras: Aprilo, anstataŭ Aprilo-Majo.

Esperanta rondo de gimnazianoj el ŝtata klasika gimnazio en Bygoszcz kun nia fervora kunlaboranto Profesoro Sygnarski.

EL „PEDAGOGIA REVUO”.




### LA SOLVOJ EL No. 9.

2. Korespondadresoj (jaro — porkejo — ansero — norde — spado).

Premion gajnis:

Fino Bernardi, Genevo (Svis) kaj S.ro Nülo Arpomaa, Suomi (Finl).

### ENIGMOJ.




a, a, g, k, l, n, n, n, o,  
o, s, t, t, u, u, ŭ, ŭ.

La vortoj signifas:

Horizontale: 1. Prepozicion; 2. Numeralon;  
3. Parencon.

Vertikale: 4. Monaton.



e, e, ĉ, ĉ.

La vortoj signifas:  
nifas, horizontale kaj vertikale:

1. Adverbon; 2. Prepozicion.

Varsovio (Pol).

E. M. MOSEJO MILVERGEV. (15 jara).

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis 15 Julio '37.

### ENIGMO.

Estis bela tago. Miaj edzino, filino kaj mi iris bicikle al Bergen aan Zee (ĉe la marbordo). Kiam ni alvenis, estis ĝuste tagmezo. Ni intencis resti tie 4 horojn, sed..... ni ne havis poŝhorloĝon. Kion fari? — Mi proponis fari sunhorloĝon. Tial ni metis bastoneton en la sablon, vertikala. Ĉirkaŭ ĝi ni desegnis cirklon. Ĉe la fino de la ombro de la bastono ni metis la ciferon 12. En la mala direkto: 6. Poste ni dividis ambaŭ duoncirklojn en ses partojn kaj metis ĉe la partoj la ciferojn 1, 2, 3, ktp. Jen la horloĝo estis preta. Post kelkaj horoj pasis sinjoro. Ni demandis al li, kioma horo estas. Estis la kvara. Antaŭ ol foriri ni rigardis nian sunhorloĝon.

Sed..... kion ni vidis?

Kiu komprenas la eraron en ĉi sunhorloĝo? Skribu vian opinion al la red. de „La Juna Vivo”. Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn.

Bergen (Ned.)

G. LUNGE.

**MLADEN FARAS NEĜOVIRON.  
MLADEN ANKAŬ SCIPOVAS PAROLI ESPERANTON.**



Li naskiĝis la 29-an de Majo 1935, kiel unua fileto de S.ro Ivan Kitoniĉ, en la jugoslava urbeto Gjurgjevac. La gepatroj decidis fari eksperimenton kaj esperantigi lin tuj. Ili estis scivolaj, ĉu la eksperimento sukcesos. La rezulto estis tre kontentiga: Cion, kion li povas esprimi, la malgranda Mladen diras en Esperanto, kaj li ankaŭ komprenas nur Esperanton, krom kelkaj nacilingvaj vortoj. Do, oni povas diri, ke jen estas unu nova Esperantisto, kies gepatra lingvo estas Esperanto. La 1-an de Februaro Mladen ricevis fratineton; ankaŭ ŝi fariĝos Esperantistino, tuj, kiam ŝi kapablos ekparoli. Kiu ŝatas ĝojigi la malgrandan Mladenon sendu al li salutkarton, aŭ ian esperantaĵon, taŭgan por bubeto en lia aĝo. La adreso de lia

patro: Ivan Kitoniĉ, bakista metiisto, Gjurgjevac (Savska ban.), Jugoslavio.  
EL „HEROLDO DE ESPERANTO”.

**SE MI ESTUS RIĈA (Premiita verkajo).**

Se riĉa homo mortus, kaj mi estus lia heredonto, aŭ se mi estus sufiĉe lerta por laborgajni multan monon, mi bone pensus, kiel uzi ĝin. Mi certe ne volus labori en vendejo, sed studi Esperanton por paroli ĝin tre flue. Poste mi konstruigus hospitalon honore al d.ro Zamenhof, en lando, kie ĝi estus plej bezona.

Post tio mi aĉetus domegon apud la marbordo, kaj invitus ĉiujn tre lacajn patrinetojn de la urboj por feliĉe libertempi apud la maro.

Mi ankaŭ volus aĉeti grandan, saĝan kaj fidelan hundon, kaj kelkajn fruktarbejojn. Mi manĝus multajn fruktojn, kaj mi invitus ĉiujn vilaĝanojn, infanojn, ankaŭ manĝi. Mi volus, ke ili estu tre feliĉaj!

Ho, ke mi estu riĉa!

Brislington (Angl.).

MILDRED CHURCH.

## ESPERANTO EN LA LERNEJO.



Dum la paska ferio okazis interlerneja vizitado internacia per Esperanto. Grupo de dek du francaj lernantinoj (11-17 jaraj), plejparte lernantinoj de F.ino\* Lepachelet en Somain, vojaĝis al Birmingham en Anglujo, por konatiĝi kun la anglaj lernantinoj de F.ino Nora Sheppard (kiu instruas Esperanton en Tinker's Farm Popollernejo) kaj la kimraj lernantinoj de F.ino Rees el Neath. Entute 19 lernantinoj loĝis en la lernejo mem. Efektive estis treege gaja kaj feliĉa spektaklo. --- La restado en la lernejo, unu el la plej modernaj popollernejo, estis senpaga, laŭ la permeso de la urba edukestraro. Tie estis aranĝitaj skribĉambro, oficejo, granda ludhalo, manĝejo, kaj dormejoj. La kuiradon prizorgis la direktorino de la apuda unuagrada lernejo, kies revo, de la tempo kiam ŝi fariĝis esperantisto, finfine realiĝis. La direktorino de la gastiganta lernejo ankaŭ ĉiutage partoprenis, kaj ĝentile helpis kaj faciligis ĉion. Dum la semajno okazis ĉiutage ekskursoj kaj en la vesperoj oni aranĝis koncertojn, paroladojn pri la lokoj vizitotaj, kun lumbildoj, kaj multajn diversajn ludojn. Unu tagon oni „exploris” Stratford-on-Avon, la naskiĝlokon de Shakespeare, alian tagon oni vizitis modernan fabrikon.

Esperable tian ekzemplon sekvos aliaj, ĉar estis vera paŝo antaŭen, kiu taŭge okazis en la 50-jara jubileo de Esperanto.

El „HEROLDO DE ESPERANTO” (iom mallongigita).

\* F.ino Lepachelet instruis la knabinojn per „La Juna Vivo”-Internacia lernolibreto.

LA ORIOLO  
(Ĉenkanto por 2 voĉoj).

① 1-D 5 1 . 2 3 5 | 1 . 6 5 4 |  
El dom' vin vo - kas mi - a kri': „La

② 3 1 2 7 | 1 2 3 1 5 5 | 1 . 2 3 5 |  
o - ri - o - lon serĉu ni!” Al ni a - non - cos

1 . 6 5 1 7 | 1 4 3 2 | 1 . 0 5 5 |  
ĝi - a kant': Re - so - me - ras en la land'! Du - del

1 5 5 5 5 5 5 | 5 1 1 1 1 1 1 |  
djo kan - tas ĝi, du - del - djo kan - tas ĝi, Du - del

5 3 1 3 5 5 | 1 . 0 ||  
djo kaj ne - ni - on pli.

Ĝi loĝas en la kverkarbar',  
Ornamas sin per orplumar';  
Per sia ŝalm' el nia kor'  
La malĝojon sorĉas for.  
Dudeldjo kantas ĝi, (2×)  
Dudeldjo kaj nenion pli.

Trad. PETRO RULOFIDO.

\*) El: Internacia Kantaro „La Juna Vivo” (vidu paĝ. 32).

## KOMPATINDA ETULINO.

En Belgio oni starigis antaŭ kelka tempo milit-monumenton, kiu havas apartan karakteron.

Sur staranta ŝtono estas videbla en cirklo knabineto.

Kiam la germanoj okupadis Belgion, estis en iu malgranda loko de belga provinco granda barakaro, en kiu ili tenis multajn francajn milit-kaptitojn. Tiu barakaro, parte konsistanta el tendoj por la kaptitoj, kompreneble estis ĉirkaŭita de barilo. La francaj kaptitoj ne havis la eblon forkuri. Ĉirkaŭ la kaptitejo gardis diversaj germanaj soldatoj, kiuj devis zorgi, ke la kaptitoj ne interrilatu kun homoj ekster la milit-kaptitejo.

En tiu loko, kie estis la barakaro, loĝis en la tempo, kiam la germanoj estis mastroj en Belgio, la dekjara Ivonne Vilset. Ĉiun tagon ŝi iris kun la patrino al la patro por alporti manĝaĵon. Li laboris en fabriko ekster la vilaĝeto.

La vojo al la fabriko kondukis preter la barakaro. Iun tagon Ivonne volis doni kukon tra la barilo al unu el la francaj soldatoj. La gardostaranto malpermesis tion al ŝi. La knabineto, kiu evidente ne komprenis, ke ŝi faras ion, kio estas severe malpermesata, ĵetis la kukon trans la barilon. Subite eksonis pafokaj ĝismorte trafite la knabino falis. Sammomente ŝi faris la lastan spiron.

Certe vi komprenas, kiom multe la gepatroj malĝojis, kaj kiom granda estis la konsterniĝo de la homoj.

La germana soldato faris laŭ siaj ordonoj, sed eble neniam li forgesis la kruelan pafon.

Tiu ĉi okazaĵo estas skulptita sur la monumento. La homoj el tiu loko tamen ne diru al siaj infanoj: „Jen, tiom kruelaj estas la germanoj”, sed ili diru honeste al ĉiu: „Tiom kruelaj la homoj fariĝas en la milito.”

Trad. VANE.

## PRI ANTRACITO.

Ĉu vi sciis, ke antracito, la plej bona brulaĵo, kiun ni uzas dum la severaj vintraj tagoj en niaj fornoj, ankoraŭ antaŭ nelonge estis forĵetata kiel senvalora rubaĵo?

Proksimume antaŭ unu jarcento okazis, ke iu sinjoro Jesse Fell, loĝanta en Pensilvanio (Usono), ĵetis sen-intence kelkajn antracit-pecojn sur gaje krakantan fajron. Kiu priskribos la ekmiron de tiu homo, kiam li subite vidis, ke la neŝatataj nigraj ŝtonoj ekbrulas. Kaj eĉ ili ne nur brulis, sed disradiis grandegan, nekon-



atan varmon. Jesse Fell laŭte kriante elkuris sian domon kaj kunvokis konatojn kaj najbarojn.

Neniu kredis lin, sed ĉar la homo ja estas scivolema, ili tamen iris rigardi, kaj..... efektive, Jesse pravis. Ĝi brulis kiel peĉo!

Malmulte la bravaj homoj supozis, kiom grandsignifa estis la eltrovo, kiun ili faris. Nur ĝojon ili sentis, ĉar ili trovis tiom malmultekostan brulaĵon. Antracito kostis ja, praktike dirite, neniom. Tio tamen baldaŭ ŝanĝiĝis: daŭris ne longe, kiam antracito fariĝis hejtaĵo, kiun oni devis kare pagi.

Kiam cent jaroj pasis post la sensacia eltrovo de Jesse Fell, la fratoj Vejs, kiuj loĝis tiam en la domo de Fell, aranĝis grandan antracit-fajron sur la sama kameno, sur kiun Jesse hazarde iam ĵetis la pecetojn da „nigra oro”. Kaj same kiel Fell faris, ili kunvokis la najbarojn, kiuj tamen pasigis alian vesperon ol iam la prapatroj.

Trad. VANE.

### AL LA LEGANTOJ.

„La Juna Vivo” nun ekzistas tri jarojn. Ĝenerale la redakcio povas esti kontenta. La nombro da abonantoj regule kreskas, kvankam ne tiom rapide, kiom la eldonantino dezirus. La recenzistoj preskaŭ senescepte laŭdas la gazeton. — Tamen la eldono postulis kaj postulas multe da mono. Kvankam la redakcio neniam plendis pri monperdo, nek petis subtenon de iu ajn, ĝi ne volas prisilenti, ke la malprofito estis granda, precipe dum la unua kaj dua jaroj. Estas pro tio, ke la nombro da junuloj, kiuj studas Esperanton, estas nur malgranda. Fakte estas la pli aĝaj legantoj, kiuj savas la gazeton. La eldonantino klopodas redakti la gazeton tiel, ke ĝi ankaŭ plaĉas al plenkreskuloj. Laŭ multaj ricevitaĵoj leteroj ŝi plene sukcesis en tiuj klopodoj. Ŝi ne nur enmetis amuzajn rakontojn, sed precipe tiujn, kiuj parolas al la koro de la leganto. Estis amo al la homoj, kiu kreis Esperanton. Ni montru nin veraj adeptoj de nia majstro! — Tial la redakcio kuraĝas peti la legantojn: Restu fidele al „La Juna Vivo”, por ke ĝia ekzistado estu certigita!

## LA DUDEK NAŬA LEClONO.

## A. La fosiloj.

Antaŭ multaj jarcentoj iu franca reĝo venigis tri laboristojn kaj diris al ili: „Gravan premion mi donos al tiu, kiu fosos plej longan sulkon!”

La du unuaj laboristoj komencis disputadi pri la meritoj de siaj fosiloj.

„Bona fosilo devas esti longa,” diris unu.

„Ĝi devas esti larĝa,” diris la alia.

Dum kiam ili disputadis, la tria per pli malpli bona fosilo fosis sian sulkon kaj gajnis la premion.

Esperantistoj, karaj kunbatalantoj, ni ne perdu nian tempon, babilante kaj diskutante: Ni fosu nian sulkon!

Vivu nia Zamenhofa Esperanto!

El: „VORTOJ DE PROF. CART”.

**B.** **Bo**-patro = la patro de mia edz(in)o; **bo**-fratino = fratino de mia edz(in)o; **bofilo** = edzo de mia filino; bofrato; bo-patrino; bofilino;

**C.** Patro kaj patrino = **gepatroj**; frato kaj fratino = **gefratoj**; Sinjoro(j) kaj sinjorino(j) = **gesinjoroj**; gefiloj, geonkloj, geavoj, geamikoj, gefianĉoj.

a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn. b. Laŭtlegu la lecionon. c. Kopiu kaj traduku A, B, C. d. Rakontu la enhavon de „La Fosiloj” per propraj vortoj.

**AL LA ABONANTOJ DE „LA JUNA VIVO”, KIES ABONOJ  
FINIGOS JE I JULIO.**

La red. de „LJV” organizas lotumadon inter tiuj abonantoj, kiuj pagis sian jarkotizon **antaŭ 20 Junio**.

Kaptu la okazon gajni belan Esperanto-verkon! Pagu vian novan jarabonon antaŭ 20 Junio, eble vi gajnos unu el jenaj premioj:

„La Aventuroj de Marteno Drake”, „Hameto”, „Lingvaj Respondoj”, „Fabeloj de Andersen”, „El la Nebulo”, „Imenlago”, „Verama Raporto pri la German-Molsa Milito”, „Mimi Pinson”, „La Interrompita Kanto”, „La Fundo de l’Mizero”, „Mia Poezio”, kelkaj binditaj jarkolektoj de „LJV” No 3, Internaciaj kantaraj „LJV”, Internaciaj lernolibretoj, ktp.

En ĉi tiu konkurso ankaŭ rajtas partopreni la novaj abonantoj, kiuj pagis sian kotizon antaŭ la menciita dato. **Jen do bona okazo por varbi novajn abonantojn! ! Ciu faru sian eblon! !**

## LA TRIDEKA LECIONO.

## A. En butiko.

Tri knabetoj envenis la butikon de grumblema, maljuna drogisto.

„Nu, kion vi deziras?” li demandis la unuan knabeton.

„Por dek cendoj da mento,” diris la knabeto.

La maljunulo alportis ŝtupetaron kaj prenis skatolon de la plej supra breto. Post kiam li helpis la knabeton, li ree surgrimpis la ŝtupetaron kaj formetis la skatolon. Kiam li ree estis malsupre, li demandis la duan knabeton: „Kaj kion deziras vi?”

„Ankaŭ por dek cendoj da mento,” diris la bubeto.

„Ĉu vi tion ne pli frue povis diri?” kriis la drogisto, irante denove al la ŝtupetaro. Kiam li jam metis piedon sur la unuan ŝtupon, li sin turnis kaj demandis la trian knabeton: „Kaj vi, ĉu eble ankaŭ vi deziras por dek cendoj da mento?”

„Ne, sinjoro,” diris la tria knabeto.

Kiam li helpis la duan knabeton kaj portis la skatolon supren, la drogisto formetis la ŝtupetaron kaj demandis la trian knabeton:

„Nu, kaj kion vi do deziras?”

„Por kvin cendoj da mento!” estis la respondo.

**B.** Plena — plen-**um**-i; proksima — proksim**ume**; cerbo — cerbumi; akvo — akvumi; malvarmumi; komunumo; kolumo; manumo; mastrumi; sapumi; ventumilo; palpebrumi; kalkanumo; nazumo; lotumi, gustumi; aerumi; foliumi, serpentumi; orumi; krucumi; kulerumi; ombrumi.

a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn. b. Laŭtlegu la lecionon. c. Kopiu kaj traduku A kaj B. d. Respondu al jenaj demandoj:

Kiuj envenis la butikon? Kian butikon ili eniris? Kia estis la drogisto? Kion li demandis? Kion bezonis la unua knabo? Kie estis la skatolo kun mento? Kion la drogisto bezonis por preni la skatolon? Kion deziris la dua knabo? Ĉu la drogisto ĝojis pri tiu mendo? Ĉu li tuj denove suriris la ŝtuparon? Ĉu la tria knabo ankaŭ bezonis por dek cendoj da mento? Ĉu li tuj diris, kion li deziris? Ĉu la drogisto denove formetis la skatolon? Kion bezonis la tria knabeto?

**Urgajn** mendojn oni sendu **ne** al la perantoj, sed rekte al „La Juna Vivo”!

## LA SKOLTOJ KAJ LA MONDLINGVO.

El konata nederlanda revuo mi tradukis jenan artikoleon:

„Kio estas ĵamboreo vi povos sperti, se vi en Aŭgusto '37 venos al „Vogelenzang” kaj eniros la pordegon de la 5a mond-ĵamboreo. Vi trovos tie grandegan tendaron de ĉiunaciaj skoltoj. Je via mirego vi vidos tie grupetojn da skoltoj: hindoj apud islandanoj, skotoj, amsterdamanoj. Ili parolas la mondlingvon de la internacia amik-eco: „ĵamborea”, tio estas paroli per manoj kaj piedoj!”

Trafan ekzemplon, ke la supra „mondlingvo” neniel sufiĉas, mi legis en „Skolta Bulteno”. En la artikolo: „Kial mi fondis nian skolt-esperantistan rondon”, la hungara skoltestro, Ernesto Farkas, raportas pri siaj spertoj en internacia tendarego. Li i.a. rakontas:

„Unu el la plej junaj knaboj aspektis tre malgaje. Mi demandis al li: „Kio estas al vi?” — La skolteto respondis: „Mi estas malĝoja, ĉar mi ne povas paroli kun la alilandaj knaboj. Mi ne scipovas fremdajn lingvojn, kaj tute ne povas kompreni ilin. Ĉu vi povas helpi min?”

Jen do forta pruvo, ke en internacia tendaro Esperanto estas nepre necesa! Bedaŭrinde, ke ankoraŭ ekzistas homoj, kiuj opinias, ke la „lingvo de manoj kaj piedoj” sufiĉas.

---

## LUDO (Kio estas tio?).

La gvidanto priskribas ion per dek mallongaj frazoj. La ludantoj devas diveni, kio ĝi estas. Ĉiu rajtas diveni nur unu fojon. Kiu scias la respondon, notas ĝin, silentante, kun la numero de la priskribanta frazo. Kiu divenas ĝuste je la unua priskribo ricevas dek poentojn; je la dua, naŭ poentojn, ktp.

Kompreneble la gvidanto devas antaŭe aranĝi la priskribojn.

**Ekz.:** La gvidanto elektis kiel sekretan objekton „galanton”. La dek priskriboj povas esti: 1. Ĝi estas kreskaĵo. 2. Ĝi estas malgranda. 3. Ĝi estas modesta kaj simpla floro. 4. Ĝi havas mallarĝajn foliojn. 5. Ĝi ne havas trunketon. 6. La koloro de ĝiaj floroj estas blanka. 7. Ĝi tute ne timas malvarmon. 8. Ĝi anoncas la printempon. 9. Ĝiaj floroj pendas kiel sonoriletoj. 10. Ofte ĝi kreskas kaj floras abunde, dum la neĝo ankoraŭ kovras la teron.

Buinen (Ned.).

M. MEDEMA.

**ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).**

**ESPERANTA SOMERA LERNEJO** estos organizata de la „grupo de Esperantistaj geedukistoj” dum Aŭgusto '37. Ĝi okazos en POISSY, urbeto proksime de Parizo. Oni vizitos la internacian ekspozicion: Frataj, ĝojaj, instruaj libertempoj. Eksterlandaj geinstruistoj, vizitu la „Esperantan someran lernejon”. Petu sciigojn al: Micard, instruisto, Epineux-le-Seguín (Mayenne), Francujo.

**LA VOJO**, poemo de D.ro L. L. Zamenhof, muziko (kanto kaj fortepiana akompano) de René Deshays. Tria eldono. Reeldonis Centra Librejo en Parizo. Mendebla ĉe „La Juna Vivo”. Prezo 0,20 gld.

**REMBRANDT LA MAGHISTO (La tragedio de artista vivo)**, de M. Muller. Eldonis Schokker, Amsterdam. Bele bindita, artpresa papero, 100 ilustraĵoj. Prezo: En Nederlando 2,40 gld., eksterlande 2,50 gld.

**ESPERANTISTA DONACETO**, pri kiu dum la tuta jaro memoras via amiko, estas abono al „**LITERATURA MONDO**” (jarabono 4,50 gld.; specimeno 0,20 gld), aŭ al „**LINGVO LIBRO**”, kiu informas vin pri ĉiu okazo en nia literaturo. (Abonprezo por jaro (3 ekz. kune sendataj) 0,80 gld. Specimeno 0,15 gld.).

**INTERNACIA LEGAĴO**. Petu de red. „La Juna Vivo” 10 diversajn Esperanto-gazetojn. Prezo 0,40 gld. (3 resp. kuponoj).

**INTERNACIA KANTARO „LA JUNA VIVO”**. Ĵus aperis la nova kantaro, kiu enhavas 34 kantojn kun muziknotoj. Prezo: 0,35 gld; 1 dan. kr; 0,8 sv. kr; 0,9 ŝil; 4 fr. fr; 0,8 n. kr; 0,2 dol; 0,7 sv fr. (Grupoj ricevas rabaton).

**ESPERANTO KAJ SKOLTOJ**. Zorgu, ke el ĉiu lando almenaŭ unu skolto salutu en Esperanto la kunvenon de la Skolta Esperantista Ligo okaze de la aŭgusta monda tendaro en Nederlando! Trovu inter la ĵamboreanoj unu skolton, kiu reprezentos vin! La ĵamborea Esperanto-Komitato donas pluan detalon kaj sendas cirkuleron. Adreso: J. L. H. Moll, Wasstr. 2, Leiden, Nederlando.

**ĈIU POSEDU la Jubilean numeron de „Brita Esperantisto”**, prezo nur 0,30 gld. (48 paĝ.) Presita sur bona papero, belaj ilustraĵoj. Altvalora enhavo, tre rekomendinda. Mendebla ĉe red. „La Juna Vivo”.

**PETO!!!** Por ke juna fraŭlino povu esti sendata Svisujon, por resaniĝi je blindiĝo, ni petas al la tutmonda samideanaro donace sendi ĉiajn eluzitajn poŝtmarkojn. Ni bezonas 1 milionon; jam havas 300.000. Ne prokrastu. Adreso helpkomitato: S.ro P. J. W. Schilpenoord, Berkelselaan 43B. Rotterdam-N, Nederlando.

**KURSGVIDANTOJ** atent! Ni helpas al vi dum la kurso kaj sendas donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, Budapest VII, Mária-u 34.

**EN LA M.E.B.-SERIO APERIS: J. R. Scherer:** „Tra Usono kun ruliĝanta Hejmo” kaj: **J. Glück:** „El la klasika periodo de Esperanto (Grabowski kaj Kabe). Prezo: po 0,35 gld. La tuta serio kostas 2,50 gld.

**MEMOR-GLUMARKOJ**, (50-jara jubileo de Esperanto). Eldonis „Niaj Vizaĝoj”. Prezo: 0,15 gld. po 50 ekz. Mendeblaj ĉe „La Juna Vivo”.

### KORESPONDADRESOJ.

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

**Aŭstrio:** Nigl Karl, lerneja servisto en Aigen, 59 Mühlkreis, deziras korespondi. Certe respondos.

**Belgujo:** Samideanoj ĉiulandaj: Ni atendas viajn kartojn, leterojn, por nia 1a jarfesto. Interŝ. pm. M. v. d. Linden, Instruisto, Astene-Deinze.

**Ĉeĥoslovakujo:** 16 jara fraŭlo dez. interŝ. ĉeĥosl. poŝtmarkojn, por aliaj, precipe eŭropaj. B. Maly, Uhersky Brod.

**Ĉeĥoslovakujo:** F.ino Lida Holoubková, Instruistino, Olomouc III, Frída Svoboda 4, dez. kor. kun diverslandaj gesamid. kaj geinstruistoj. Resp. certa

**Ĉinujo:** Kdo Zheng Zhung, No 29 Lane 316, Peking Road, Shanghai, deziras korespondi pri ĉiaj temoj. Dez. ricevi fotojn kaj esperantaĵojn.

**Japanujo:** 19 jara liceano dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. poŝtk. il. kun ĉiuj landoj. S. Sasai, c/o Daiooji, Kacujama-mura, Jojouragun, Yamaguĉi-ken.

**Nederlando:** Joop Blok, 17 jara knabo, dez. kor. pri ĉiuj temoj, kaj interŝ. poŝtm. kaj esperantaĵojn kun ĉiuj landoj. Amsterdam, Adr. Vespuccistr. 64<sup>a</sup>.

**Nederlando:** S.ro J. M. Toorneman, Diepenveenseweg 169, Deventer (Instruisto en popollernejo) petas korespondadon kun fremdaj samideanoj.

**Polujo:** 15 jara junulo, Mosco Milverger, ulica 5 m 3, Warszawa, dez. korespondi kun ĉiuj landoj. Petas enmeti fotografajon.

**Polujo:** 4 junuloj dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Tuja respondo garantiita. R. Wajutraub, Warszawa, ul. Grykowska 30 m 25.

**Sovetio:** S.ro Ivan Salimov, ul. 11 maja 4, Voroneĵ, dez. kor. k. holandanoj.

**Nederlando:** 14 gejunuloj (12-16 jaraj) volonte korespondos kun grupo de 14 eksterl. samaĝaj esperantistoj. S.ro H. v. Dam, Holleweg 30, Heiloo.

**Nederlando:** La infangrupo „La Verdaj Pigoj” aranĝos letervesperon. Kiu sendas poŝtk. aŭ let.? Certa resp. P. Becker, Winterdijk 15a, Gouda.

**Nederlando:** F.ino Bets Oostwoud Wydenes, Abbekerk A 103 (NH), farmistfilino 25 jara, dez. kor. per leteroj kaj il. poŝtkartoj.

**Nederlando:** 34-jara librotenisto dez. kor. kun geviroj pri seksaj temoj. Certe respondos. Skribu al: J. Tromp, Hugo de Grootstr. 14, Purmerend.

Ĉiu, kiu varbos 2 abonantojn je „La Juna Vivo” donace ricevos la novan kartaron „LJV”.

### KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Esperantaj grupoj en jenaj lokoj enkondukis „La Juna Vivo”n: „Internacia Lernolibreto” en: Harlemo (Ned.) (infankurso, 80 anoj!); Staden, Belg; Tonsberg (Norv.).

La kvaran jarkolekton en: Koedijk, Uitgeest, Driehuizen, Oterleek (Ned.)

2. Rakontoj, tradukitaj el „La Juna Vivo” aperis en: Monata Bulteno de Esp. Soc. „Nova Sento” en Barcelona (La Matsujama Spegulo, el „LJV” No 7-’37.

„Slniecko”, Ĉeĥa Infangazeto: (La Amerika Vekhorloĝo, el „LJV” No 8. Trad. J. V. Dolinsky, Turĉ., Sv. Martin Ĉeh).

Sekvu la suprajn ekzemplojn! Traduku la plej bonajn rakontojn el „La Juna Vivo” en vian gepatran lingvon kaj sendu ilin al ĵurnaloj kaj revuoj. Tiel vi multe propagandas Esperanton!

### VIZITO AL SVISUJO KAJ PARIZO.

(Malkara 15 taga vojaĝo al Sv. kaj. P. Entute 52 guld.

Vidu la januaran numeron).

La organizanto de la vojaĝo faris du ŝanĝojn en la programo, kiuj plej verŝajne havos la plenan aprobon de la kunvojaĝantoj.

1. London, la 2an de Aŭgusto, la karavano ne restos en Lozano (Lausanne) sed vizitos Ĝenevon. Ni supozas, ke ĉiu deziras vidi ĉi mondfaman urbon. Svisa samideano promesis gvidi nin tra la urbo. Ni vizitos i.a. la palacon de la Ligo de Nacioj.

2. Dum Aŭgusto okazos en Poissy, loko proksime de Parizo, esperanta somera lernejo por francaj geedukistoj. Ni turnis nin al la organizanto, S.ro Micard, kun la peto serĉi por ni tendaron tie. Li bonvole akceptis la peton, tiel ke ni dum nia restado en Parizo povos havi daŭran kontakton kun francaj gesamideanoj.

La vojaĝo do fariĝos vera festo. Kiu ankoraŭ deziras partopreni anoncu sin baldaŭ.

### RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

**KORO**, de Edmondo de Amicis. Trad. el la itala lingvo X; 320 paĝoj; Prezo: 1,30 gld. Eld. A. Paolet.

La subtitolo de ĉi libro estas „Libro por knaboj”, tamen ankaŭ plenaĝuloj certe plezure legos la verkon, ili trovos en ĝi multon por pripensi kaj meditati. Ne necesas diri multon pri la enhavo, ĝi jam estas famkonata, kaj senĉese tradukita. Ni nur povas esprimi nian ĝojon pri la bonega traduko en Esperanto. Lingvo kaj stilo estas bonegaj. Ni varme rekomendas la verkon!

**JARLIBRO DE LA INTERNACIA ESPERANTO-LIGO, 1937.** Neaĉetebla, sendata nur al individuaj membroj de IEL. Kotizoj: Membro kun jarlibro: 4 angl. ŝil. Membro-Abonanto: 10 angl. ŝil. Informoj ĉe: Centra Oficejo de IEL, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

**KONTAKTO**, monata organo, kvarpaĝa. Eld. Ned. Esperanto-Centro. Schiedamseweg 209 b, Rotterdam. (Ned.) Jarabonprezo 0,25 gld.

**ESP.-POSTMARKOJ.** Mendu per ilustrita poŝtkarto senpage unu belan poŝtmarkon de la brazila poŝto kun teksto en Esperanto. Via respondo estos utila en Brazilo. Adr: S.ro Ismael Braga, Rue Jose Vicente, 79 Andarany, Rio de Janeiro, Brazilo.

**Esperantaj gazetoj, aboneblaj ĉe ni:**

<i>Verda Revuo</i> , monata ... jara	f 1,50	<i>Literatura Mondo</i> , monata jara	f 4,50
<i>Nia Gazeto</i> , monata .....	„ f 1,35	<i>Niaj Vizagoj</i> , monata .....	„ f 0,75
<i>Scienca Gazeto</i> , dumonata „	f 1,50	<i>Esperanto-Internacia</i> , mon. „	f 2,50
<i>Heroldo de Esp.</i> , semajna „	f 6,80	<i>Bulteno de I.S.A.E.</i> , dumo-	
<i>The British Esp.</i> , monata „	f 1,20	nata, .....	„ f 1,35
		<i>Sennacieca Revuo</i> , monata „	f 2,50

**Specimenoj.** Ni sendas senpage specimenon de „La Juna Vivo”. Specimeno de *Literatura Mondo* kostas 20 cendojn. Ni ĝenerale havas ekzemplerojn de la aliaj kaj volonte sendas ekz. al iu ajn interesato kontraŭ 5-cenda poŝtmarko holanda aŭ egalvaloro.

<p><b>SKRIBA KURSO</b> por A. kaj B. (nur por holandlingvanoj).</p> <p>Tre detala B-kurso. Gvidanto <b>Simon Aarse.</b></p> <p>Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis.</p> <p><b>La Verda Stelo, Radioweg 45, Amsterdam-O.</b></p>	<p>La ĉarma „verda” Danlando vokas vin al: <b>„MARBORDA ESPERANTO-RESTADO INTERNACIA”</b> en: <b>Fuglso, Aarhus,</b> de la 18a ĝis la 28a de Julio. Plena pensio: 13 gld. Ĉiaj informoj ĉe S.ro Harald Grönborg, Risskov, Danlando; S.ro August Weide, Hamburgo (Germ), kunlaboranto.</p>
<p><b>KIAL</b></p> <p>vendiĝas tiom multaj binditaj jar-kolektoj de</p> <p><b>„LA JUNA VIVO”?</b></p> <p>Ĉar tiuj libroj pro sia varia enhavo (por komencantoj kaj por progresintoj) fariĝas nepre bezonata studilo en ĉiuj kurs- kaj grupvesperoj!</p> <p>Prezo: 1,6 sv.fr. = 0,75 gld. Grupoj kaj abonantoj ricevas rabaton.</p>	<p><b>JEN LA SOLVO!</b></p> <p>Vi ne kuraĝas starigi esp. kursojn, ĉar vi ne estas sperta instruisto? Ne timu, per la simpla metodo en la „Internacia Lernolibreto”</p> <p><b>„LA JUNA VIVO”</b> vi povas instrui!</p> <p>La tre malalta prezo kaj la varia enhavo certe allogos multajn kursanojn! Petu specimenon!!! (0,20 gld. aŭ 2 resp. kup.).</p>

**Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan libro-liston!!)**